# Tri rozo-floroj el unu tig'

## ES BLÜHN DREI ROSEN AUF EINEM ZWEIG




2. Infano nestas en via sin'.
   La Fil' de Dio etigis sin.

3. Sur via brako vi tenas Lin,
   la bebon, kiu kompatos nin.

4. Vi sceptron havas en via man'.
   Ĉiel-Reĝin', sanktulara an'.

5. Vi portas kronon el pura or'.
   Vi portas ĝin al la Di-honor'.

ES BLÜHN DREI ROSEN AUF EINEM ZWEIG • M kaj germana T: anonimaj, eble el Silezio aŭ el Alsaco • E: Albrecht Kronenberger 2017-06-14

*La melodio kutime estas G-maĵora en okonoj kun la taktindiko 2/4.*